

Stalin lernis Esperanton !

Kiam mi antaŭ nelonge tralegis la du volumojn de la Stalin-biografio, verkita de Leo Trotzki (Trockij) ĝis la jaro de lia perforta morto en 1940, en la unua volumo, ĉapitro „Periodo de la reakcio”, mi trafis neatendite tri alineojn, kiuj atestas, ke Stalin lernis Esperanton, nome plej verŝajne en la jaro 1910 en la Bailov-prizono de Bakuo (Azerbajĝano). Pri ĉi tio mi ĝis nun ne legis en la ĉefaj referencaj verkoj de la Esperanto-historiografio kaj ne sciis ĝin, sed poste mi informiĝis, ke Solzbacher en 1958 (American Esperanto-Magazine n-ro 53), Lins en 1994 (Monato n-ro 15, Grigorjevskij en 2001 (rusa interreto) kaj Sikosek en 2006 (disertacio) jam diversmaniere atentigis prie. Nature, la Stalin-biografio de Trockij, verkita fine de la 30aj jaroj kaj unuafoje publikigita en 1946 en la angla kaj eldonita en 1952 en la germana lingvo, ne estis alirebla en la socialisma bloko, kie la verkaro de Trockij estis severe malpermesita, kaj en Okcidento ĝi eble estis konata al nur malgranda rondo de Trockij- kaj Stalin-fakularo, kiu havis la okazon legi tiun Stalin-biografion (nur en 1971 la teksto aperis germanlingve kaj estis reeldonita en 2001, kaj en 1990 ĝi aperis unuafoje en la rusa lingvo en Ruslando).

En „La danĝera lingvo“ de Ulrich Lins, p. 357, estas skribite en piednoto, ke ekzistis onidiro, ke Stalin iam lernis Esperanton kaj ke la aserton (pli malfrue disvastigitan de Trockij) faris rusa elmigrinto komence de 1929 (Ŝajnas ke temas pri H. Muravkin). Laŭ Lins la aserto ne estas tre kredinda. Do, kiel ajn kaj eĉ se la la malkovro jam estis farita, sed apenaŭ konata ĉe pli vasta publiko, ŝajnas al mi inde retrakti la temon, nome en pli kohera kunteksto vide al la historia daŭrigo pri la supozata sinteno de Stalin rilate al Esperanto, kiel mi klopodas en ĉi tiu kontribuajo.

La informon pri tio Trockij ĉerpis el la memoraĵoj de Semjon Vereŝĉak, kiu apartenis al la partio de la socialrevoluciuloj. Jen la traduko (rekte el la rusa lingvo kun komparo de la germana traduko) de la tri koncernaj alineoj:

Unue jen citaĵo de Trockij el ties Stalin-biografio pri la informanto Semjon Vereŝĉak (Семён Берещак):

„La socialrevoluciulo Vereŝĉak trafis en 1909 ankoraŭ tute juna la tiel nomatan Bailov-prizonon en Bakuo, kie li pasigis 3,5 jarojn. Arestita la 25an de marto (1908), Koba sidis en tiu ĉi malliberejo duonjaron kaj forlasis ĝin por esti ekzilita naŭ monatojn. Li revenis kontraŭleĝe al Bakuo, kie en marto 1910 li estis denove arestita kaj denove sidis, kune kun Vereŝĉak proksimume ses monatojn. En 1912 ambaŭ prizonaj kolegoj denove renkontis unu la alian en Narym, Siberio. Finfine Vereŝĉak renkontis sian malnovan konaton post la februara revolucio (de 1917) en la Unua Sovetkongreso en Petrogrado, en kiu Vereŝĉak partoprenis kiel delegito de la tiflisa garnizono. (...)

Post la komenco de la politika kariero de Stalin Vereŝĉak detale rakontis en iu gazeto por emigrantoj pri ilia komuna vivo en la prizono. Eble ne ĉio, kion li rakontas, estas kredinda, kaj ne ĉiuj liaj juĝoj estas konvinkaj. (...) Sed Vereŝĉak havis la ne sufiĉe taksindan avantaĝon observi Koba-n (t.e. Stalinon) en ĉirkaŭaĵo, kie la homo vole nevole perdas sian rutinon kaj la kutimojn de la civilizita kunvivado. (Sekvas klarigo pri

la kondiĉoj en tiu malliberejo, kie troviĝis 1500 prizonanoj anstataŭ la oficiala maksimumo de 400, ke la prizonanoj dormis en plenplenaj ĉeloj, en la koridoroj, sur la ŝtuparoj, ke sub tiaj kondiĉoj al neniuj eblis izoliĝi). Vereŝĉak plue skribis, ke Stalin estis ekstreme unuflankeca homo, ke li ne konis proprajn principojn kaj estis kruda, nekulturita, malklera kaj aparte ruza tipo, sed ke Stalin kiel „narodniko” apartenis al la „skolo” de la „etika” socialismo, kaj Vereŝĉak devis konfesi, ke li multe admiris la memdisciplinon de Koba Dĵugaŝvili, kiu neniam perdis sian ekvilibron kaj trankvilon.

Sekvas do la unua citaĵo pri Esperanto, kiu estas enkondukita tiel:

„Inter la prizonanoj estis ankaŭ personoj, kiuj jen hieraŭ, jen hodiaŭ estis mortkondamnitaj, kiuj de horo al horo atendadis la definitivon de sia sorto. La „mortinduloj” manĝis kaj dormis kun ĉiuj ceteraj. Antaŭ la okuloj de la arestitoj ili nokte estis forkondukitaj kaj pendumitaj en la korto de la malliberejo, tiel ke „en la ĉeloj oni aŭdis ilian kriadon kaj ĝemadon”. La nervoj de ĉiuj prizonanoj estis ekstreme streĉitaj. „Koba dormis profunde”, diras Vereŝĉak, „aŭ lernegis-studadis trankvile Esperanton (li trovis, ke Esperanto estos la estonta lingvo de la Internacio.)“ (...)

Ŝajnas, ke Trockij, kiu ekstreme malestimis la spiritajn kaj intelektajn malkapablojn de Stalino, ne trovis grandan simpatian ankaŭ por Esperanto, ĉar la du sekvantaj aludoj en la sama ĉapitro estas skribitaj en iom malvarma tono. La duafoja mencio de Esperanto troviĝas en jena kunteksto pri lingvoj kaj lingvolernado:

„Ni memoras, kiel Koba dum sia aresto en Batumi kaj Kutaisi klopodis enpenetri la sekretojn de la germana lingvo; la influo, kiun la germana socialdemokratio efektivigis al la rusa partio, estis en tiu tempo eksterordinare forta. Sed ekmaŭstro la lingvon de Markso Koba sukcesis eĉ malpli ol lian doktrinon mem. En la malliberejo de Bakuo li okupiĝis pri Esperanto kiel la lingvo de la „estonteco”. Ĉi tiu karakteraj trajtoj tre bone ilustras la intelektan amplekson de Koba, kiu dum la akiro de konoj serĉis ĉiam la liniojn de la plej malgranda rezisto. Kvankam li pasigis ok jarojn en malliberejoj kaj en la ekzilo, eĉ unu fremdan lingvon li ne sukcesis ellerni, lia malfeliĉa Esperanto ne ekskludita.”

En tiu ĉi alineo ni ekscias multajn interesajn aferojn, nome ke 1) Stalin konsideris Esperanton lingvo de la „estonteco” kaj de la „Internacio”; 2) Trockij mem konsideris, ke la lernado de Esperanto signifus, ke la intelekta amplekso de homo ne estas tre vasta kaj ke lernante ĝin oni elektas la vojon de la plej malgranda rezisto, 3) Stalin estas malbona lingvolernanto kaj ne sukcesis ekposedi fremdlingvojn. (Kiel konate, Stalin poste publikigis verkaĵojn pri lingvistikaj demandoj). Cetere estas konate, ke Stalin konis nur la kartvelan kaj rusan lingvojn.

Fine de la ĉapitro „periodo de la reakcio” Esperanto estas ankoraŭfoje menciita, jene:

„Estis la jaro 1910. La reakcio triumfis sur la tuta linio. Ne nur la amasmovado, sed ankaŭ la konfiskadoj, la teroro, la elpaŝoj de persona seniluziigo falis sur la nulan punkton. En la malliberejo fariĝis pli severe kaj trankvile. Komunaj diskutoj ne plu

okazis. Koba havis sufiĉe da libertempo por lerni Esperanton, se li ne perdis sian entuziasmon pri la lingvo de la estonteco. Laŭ ordono de la kaŭkaza guberniestro, la 27an de aŭgusto al Dĵugaŝvili estis malpermesite vivadi en Transkaŭkazio por la daŭro de kvin jaroj (...) Koba estis resendita al la gubernio de Vologda por tie fini la interrompitan dujaran ekzilon. (...)“

En la dua volumo de la Stalin-biografio de Trockij, kiu estis kompilita post la perforta morto de Trockij, Esperanto ne plu estas menciita.

(Rusa teksto ĉi tie: <http://www.magister.msk.ru/library/trotsky/trotrl030.htm>)

Stalin pri la nacia demando

Lige kun la temo Stalin kaj Esperanto estas interese atentigi pri iu artikolo, kiu aperis en la jaro 1901 en la kartvela gazeto *Brdzola* (Batalo), kiu estis nepermesita, sed la unua libera periodaĵo en Kaŭkazo, organo de la kartvelaj bolŝevikoj, kiu sukcesis eviti la cenzuron. La dua numero, aperinta en decembro 1901, publikigis longan traktaĵon pri „La socialdemokrata partio de Ruslando kaj ĝiaj venontaj taskoj“. Laŭ la skribstilo oni supozas Josef Dĵugaŝvili (Stalin) kiel aŭtoron. La traktaĵo estis resumo de artikolo, kiu aperis en la gazeto *Iskra* (redaktata de Lenin). La unua parto de la traktaĵo en *Brdzola* ampleksis prezenton de la historio de la socialismo en Eŭropo kaj Ruslando. La dua parto komenciĝis per pesimisma skizo de la subpremado en Ruslando: „Sub la jugo de la carisma reĝimo ĝemas ne nur la laborista klaso. La peza piedego de la aŭtokrata regado strangolas ankaŭ la aliajn klasojn de la socio. Ĝemas la kamparanoj, kiuj pro la konstanta malsato estas psike deformitaj. Ĝemas la malgranda homo en la urbo, ĝemas la malgrandaj ŝtatoficistoj kaj privataj entreprenoj, la malalta oficistaro, ĝenerale ĉiuj jenaj multnombraj malgrandaj urbanoj, kies ekzisto estas same malmulte sekurita kiel tiu de la laborista klaso kaj kiuj havas kialon esti malkontentaj kun sia socia pozicio. Ĝemas parto de la malgranda kaj eĉ meza burĝaro, kiu ne povas konsentiĝi per la knuto kaj la vipo de la caro, precipe la klera parto de la burĝaro (...). Ĝemas la subpremataj nacioj kaj religiaj konfesioj en Ruslando, inter ili la poloj, ofenditaj en siaj sanktaj sentoj, kiuj estas forpelataj de sia patruja tero, la finnoj, kies historie akiritaj rajtoj kaj kies libereco estis arogante surtretitaj. Ĝemas la senĉese persekutataj kaj humiligitaj judoj, al kiuj oni forrabis la mizerajn rajtojn kiel ilin ĝuas la ceteraj rusaj regatoj – la rajton ĉie loĝi, lerni en la lernejoj, la rajto servi kiel oficisto, ktp. Ĝemas la kartveloj, la armenoj kaj la aliaj nacioj, al kiuj oni forrabis la rajton havi siajn proprajn lernejojn, labori en ŝtataj oficejoj, kiuj estas devigataj, obei la hontindan kaj subjugan politikon de la rusigo, kiu praktikas la aŭtokratan regadon per tioma fervoro. Ĝemas la multaj milionoj da rusaj sektantoj, kiuj volas kredi kaj konfesi laŭ la propra konscienco kaj ne tiel kiel la ortodoksaj popoloj.“¹

Kiam Stalin skribis tiujn liniojn, li estis 23-jara kaj kredis je la socialismo, kaj kion Lenin skribadis, kaj du jarojn antaŭ la skismo inter bolŝevikoj kaj menŝevikoj, kaj kvar jarojn antaŭ la unua rusa revolucio, kaj kvin jarojn antaŭ la ĝeneva parolado de L.L. Zamenhof, dum kiu tiu ĉi plendis pri la situacio en Ruslando en iom simila tono

¹ El: Deutscher, Isaac: Stalin. Eine politische Biographie. Dietz Berlin 1990, p. 66ff.

kiel Džugaŝvili en *Brdzola* en 1901. La ŝajnaj paraleloj de la analizo de la situacio en Ruslando estas okulfrapaj, malgraŭ ideaj kaj politikaj diferencoj inter Zamenhof kaj Stalin (sed oni rekonsciu ankaŭ pri la ŝajnaj paraleloj inter la zamenhofa hilelismo de 1901 kaj la cionismaj skribaĵoj de diversaj aŭtoroj, vd. la ĉi-koncernan artikolon en *Spiegulo*, vintro 2009). Pro tio tiu atentigo estas interesa, same la fakto, ke Džugaŝvili aparte menciis en sia artikolo diversajn naciajn malplimultojn – ne nur la kartvelojn kaj armenojn, sed ankaŭ la polojn kaj judojn. Iuj „stalinologoj” poste opiniis, ke tiu artikolo estis la plej bona, kiun Stalin iam ajn verkis, kvankam temis pli malpli pri plagiato de la skribaĵoj de Lenin.

„La estonteco de la nacioj kaj de la naciaj lingvoj“

Kiel pri ĉi tiu temo Stalin pensis en postaj jaroj, informas nin ĉi-koncerna teksto el la jaro 1929. Nome en sia respondo al la „kamaradoj Meŝkov, Koval’ĉuk kaj aliaj Stalin esprimiĝis pri la teorio de la kunfandiĝo de la nacioj, la elmortado de naciaj lingvoj kaj la formiĝo de unueca komuna lingvo.

Por kompreni la tutan kuntekston necesus ĉi tie redoni la tutan ĉi-koncernan respondon el la jaro 1929, sed ni kontentigu pri unuopaj citaĵoj.

Enkonduke Stalin avertis la kamardojn, al kiuj li rirpoĉis, ke ili farus eraron, se ili ne distingus inter la „periodo de la venko de la socialismo en unu lando“ kaj la „periodo de la venko de la socialismo sur monda skalo“. Laŭ Stalin ne estis permeseble intermiksi tiujn diversajn periodojn kaj nociojn.

En tiu teksto Stalin referencis al iu prelego farita en la jaro 1925, en kiu li rifuzis la teorion, ke en la periodo de la venko de la socialismo en unu lando, ekzemple Sovetunio, la naciaj lingvoj formortas, la nacioj kunfandiĝas kaj ke aperas unu komuna lingvo.

Ĉio tio kontraŭdiras la tezon de Lenin pri la komenco de la formorto de naciaj diferencoj kaj naciaj lingvoj en la periodo de la venko de la socialismo en monda skalo kaj ke post tiu venko la naciaj lingvoj komenciĝas esti anstataŭitaj de unu komuna lingvo. Tio estus granda eraro (zabluĝdenie). Por la marksistoj ne estas allaseble intermiksi kaj kunĵeti en unu aron tiajn diversajn fenomenojn kiel la „venko de la socialismo en unu lando“ kaj la „venko de la socialismo en monda skalo“.

Post iom da teorumado pri la karaktero de tiuj diferencoj Stalin atakis Karl Kautsky, kiu parolis pri la kreo de unueca komune homa lingvo ĉe la samtempa formortado de ĉiuj ceteraj lingvoj en la periodo de la socialismo. Al Kautsky Stalin riproĉis en tiu teksto, ke li „estas kaj restas diletanto rilate la nacian demandon“. En la sama alineo Stalin skribis: „Mi malmulte kredas tiun teorion pri unueca ĉionampleksanta lingvo“, ĉar la „spertoj parolas ĉiukaze ne por, sed kontraŭ tia teorio“.

Poste li klarigis, ke la periodo de la venko de la socialismo en unu lando ne donus la kondiĉon por la kunfandiĝo de nacioj kaj naciaj lingvoj, sed male, en ĉi tiu periodo „renaskiĝas kaj prosperas la nacioj“ (kiuj „pli frue estis subjugitaj de la cara imperiismo kaj nun liberigitaj far la soveta revolucio de la nacia jugo“).

Finfine Stalin citis la teorion de Lenin, kiu antaŭvidis, ke la proceso de la formortado de la naciaj diferencoj kaj de la kunfandiĝo de la nacioj ne apartenas al la periodo de la venko de la socialismo en unu lando, sed senescepte al la periodo post la

efektiviĝo de la diktaturo de la proletaro en monda skalo, t.e. al la periodo de la venko de la socialismo en ĉiuj landoj, kiam estos establita monda socialisma ekonomio.

Laŭ Stalin estus do „erare kredi, ke la unua etapo de la tutmonda diktaturo de la proletaro estus la komenco de la formortado de la nacioj kaj naciaj lingvoj kaj signifus la komencon de la elformiĝado de unueca komuna lingvo.

Sed nur en la dua etapo de la tutmonda diktaturo de la proletaro, samtempe kun la elformiĝado de unueca komuna socialisma ekonomio, anstataŭ monda kapitalisma ekonomio, nur dum tiu etapo komenciĝos elformiĝadi io kiel komuna lingvo, ĉar ĝuste dum tiu etapo la nacioj komencos senti la neceson havi apud siaj naciaj lingvoj unu komunan internacian (meĵnacional'nyj) lingvon – kiel komfortaĵo por la trafika rilatado kaj kiel komfortaĵo de la ekonomia, kultura kaj politika kunlaborado. Krome: „Povas esti, ke komence estos kreita ne unu komuna monda ekonomia centro por ĉiuj kun unu komuna lingvo, sed kelkaj zonaj ekonomiaj centroj por unuopaj grupoj de nacioj kun unuopa komuna lingvo por ĉiu grupo de nacioj, kaj nur sekve al tio tiuj centroj unuiĝos en unu komuna monda centro de la socialisma ekonomio kun unu komuna lingvo por ĉiuj nacioj.“ Kaj: „En la sekva etapo de la tutmonda diktaturo de la proletaro, kiam la monda socialisma ekonomia sistemo fortiĝos en sufiĉa grado kaj kiam la socialismo estos adoptata de la popoloj, kiam la nacioj konvinkiĝos pri la praktiko kaj pri la avantaĝoj de komuna lingvo antaŭ la naciaj lingvoj, - tiam la naciaj diferencoj kaj lingvoj komenciĝos formortadi kaj cedos al komuna monda lingvo por ĉiuj.“ⁱ

Kompreneble, en postaj jaroj Stalin ne plu defendis polojn kaj judojn kaj ne plu distingis inter amikoj kaj malamikoj kaj ankaŭ dubis pri la „unueca komuna lingvo por ĉiuj“ (sed pri kia lingvo li pensis?) ... kaj kiel konate en la jaroj 1936-38 li likvidigis kadre de la „Granda Purigo“ krom „kulakoj“, diversaj naciaj malplimultoj, ekleziuloj, inteligentuloj ankaŭ la esperantistojn kaj Esperanto-movadon de Sovetunio, kiuj estis akuzitaj pro „spionado kun eksterlando“ kaj „kosmopolitismo“.

Tamen, Stalin ja ne perdis sian intereson pri la nacia demando kaj pri lingvaj aferoj, kiel montras lia posta traktaĵo pri „Marksismo kaj lingvoscienco“ (1950), kiun mi eble prezentos alian fojon.

Resume: En la pritrakto de la temo „Stalin kaj Esperanto (aŭ komuna mondlingvo“ necesas konsideri diversajn etapojn: Unue la jaron 1910, kiam Stalis evidente lernis Esperanton en la prizono de Bakuo, due la jarojn 1925-29, kiam li en la artikolo „Estonteco de la nacioj kaj naciaj lingvoj“ (negative) esprimiĝis pri la nuntempa bezono de tia lingvo kaj prokrastigis ĝian kreon kaj enkondukon al iu fora tempo, trie la jarojn 1936-38, kiam apud ĉiuspecaj popolaj malamikoj ankaŭ sovetiaj esperantistoj pereis kadre de la „Granda Purigo“ kiel „spionoj“ kaj „membroj de terorista organizaĵo“ kaj plej laste la jaron 1950, kiam Stalin esprimiĝis pri demandoj de la lingvoscienco. La konscio pri la laŭdira lernado de Esperanto far Stalin en 1910 kompletigas la ĉenon, kaj espereble ankaŭ pliklarigas nian bildon, kiun ni klopodas akiri pri la supozata sinteno de Stalin vidalvide de Esperanto kaj de esperantistoj.

Andreas Künzli, 2010

ⁱ http://miresperanto.narod.ru/o_vseobscem_jazyke/stalin.htm